

V-644/6 <8>

(1913)

Jaro VI (VIII)

Januaro 1913

N<sup>o</sup> 1 (69)

# ESPERANTYSTA

## POLSKI

### POLA ESPERANTISTO

#### Kuneldonantoj:

S-oj: Prof. D-ro Odo Bujwid, D-ro L. Chybczyński, M. Czerwiński, Jan Günther,  
D-ro A. Nauman.

#### Protektoroj-subtenantoj:

S-oj: L. Bogusławski, S. Essigman, Kielca Soc. Esp., J. Loth, R. Maske,  
A. Zakrzewski, D-ro Leon Zamenhof.

#### Helpantoj:

S-oj: J. Chankowski, D-ro Gelibter, B. Jabłkowski, A. Koziara, B. Radzy-  
miński, D-ro W. Róbin, B. Szczepankiewicz, J. Tejchfeld, R. Vogel, H. Wie-  
rzychowski, D-ro A. Zamenhof, F. Zamenhof.

---

Adreso de la Redakcio kaj Administracio: Varsovio, Śopena 8.

Prezo 20 kop.

## „Esperantysta Polski“

W ROKU 1913

będzie wychodzić regularnie co miesiąc w 16-stronicowej objętości o urozmaiconym programie.

Roczna prenumerata z „Dodatkęm Literackim“ 2 rb. 50 k. z przesyłką pocztową.

Adreso de Redakcio kaj Administracio: Warszawa (Polujo) Szopena 8.

## „Pola Esperantisto“

EN 1913 JARO

aperados ĉiumonate en 16 paĝa amplekso kun diversigita programo kaj „Litera Aldono“

Jar-abono kun la „Literatura Aldono“ rb. 2.50 = S 2.65 kun poŝta trasendo.

## JUS APERIS „PEKOJ DE L' INFANECO“

bela novelo de BOLESŁAW PRUS, tradukita de ANTONI GRABOWSKI.

Prezo 35 kop., por abonatoj de „Pola Esper.“ — 20 kop.

Acetebła en Administracio de „Pola Esper.“ str. Szopena 8, Varsovio.

## SI, LA TRIA

Belega novelo de Henryk Sienkiewicz, tradukita de Antoni Grabowski estas presita kaj dissendita al ĉiuj abonantoj de „Pola Esper.“ kiel aldono por dua duonjaro de 1912 jaro.

La prezo 50 kop.

## LA NEĜO

Kvarakta dramo de St. Przybyszewski (Pšibyševski) trad. J. Ficovski dissendita al ĉiuj abonantoj de „Pola Esper.“ kiel aldono por unua duonjaro de 1912 jaro.

La prezo 50 kop.

## „АНТАУЕН КUN KREDO!“

Literatura Jarlibro de „P. E.“ por 1911 jaro.

La prezo de bela 200 paĝa volumo estas: por abonantoj de „P. E.“ 0,50 Sm.  
„ ne-abonantoj 1,00 Sm.

sendebła en la Administracio de „P. E.“, Szopena 8, Varsovio.

La bela 200 paĝa volumo kun interesa kaj abunda enhavo skribita en perfekta Esperanto devas troviĝi en biblioteko de ĉiu amanto de nia lingvo kaj literaturo.


## Od Administracji „Esperantysty Polskiego“.

Uprasza się pp. prenumeratorów o zawiadamianie Administracji „Esp. Pol.“ (Szopena 8) o zmianie adresu. Nieregularny odbiór pisma bywa prawie wyłącznie skutkiem niezakomunikowania nowego adresu.


Ze wszelkimi reklamacjami prosimy zwracać się tam, gdzie została opłacona prenumerata. Administracja bezpośrednio przyjmuje reklamacje tylko od tych pp. prenumeratorów, którzy nadesłali swe zamówienia i prenumeratę wprost do Adm. „Esp. Pols.“

# POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



## ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Januaro 1913

WARSZAWA—VARSOVIO

Jaro VIII — Nro I (70)

### S a m i d e a n o j !

Bonvolu **senprokraste** renovigi Vian abonon por 1913 j., sendante abon-pagon (rb. 2,50 = 2,65 Sm.) al la Administracio de „P. Esp.”—laŭ la nova adreso:

**VARSOVIO str. ŜOPENA 8.**

(nova adreso de la Redakolo — la sama.)

Se Vi estas amikoj de la Pola Esperantisto—varbu novajn abonantojn, disdonante al Viaj konatoj niajn prospektojn.

---

---

AL NIAJ LEGANTOJ KAJ AMIKOJ NI SENDAS KORAJN NOVJARAJN GRATULOJN.

---

---

\* \* \*  
ESTU BENITA ĈIU NOBLA FARO,  
KIU PRO GRANDA BATALAS AFERO,  
KIU DISPORTAS AL TUTA HOMARO  
LUMON, SEMANTE FRATECON SUR  
[TERO,  
KAJ DUM VENTEGOJ DE BATALA  
[FLAMO  
LEVAS STANDARDON DE PACO KAJ  
[AMO.

\* \* \*  
BĄDŹ BŁOGOSŁAWION KAŻDY WIELKI  
[CZYNIE  
W WALCE O SPRAWĘ ŚWIĘTĄ  
ROZPOCZĘTY,  
Z KTÓREGO ŚWIATŁA ZDRÓJ NA  
[LUDZKOŚĆ PŁYNIE,  
W KTÓRYM ROZBRZMIEWA  
BRATERSTWA HYMN ŚWIĘTY,  
NAD KTÓRYM POŚRÓD HURAGANÓW  
BOJU  
POWIEWA SZTANDAR MIŁOŚCI,  
POKOJU.

## Przełomowa chwila.

Język międzynarodowy Esperanto, zdobyjący we wszystkich krajach z roku na rok coraz większą liczbę zwolenników — w Polsce — przyznać to trzeba — nie znalazł dotąd takiego rozpowszechnienia, jakiegoby się spodziewać należało. —

Nie trudno byłoby odnaleźć przyczynę tego zjawiska, wskazując chociażby na wyjątkowe położenie kraju naszego, nie pozwalające nam nietylko na wkładanie jakichkolwiek sił w pracę nie przynoszącą ogółowi naszemu doraźnych i łatwo przez ten ogół dostrzeganych korzyści — ale nadto utrzymujące nas w stanie ciągłej apatii myślowej. — Wszak niczym innym, jak tylko ogólną apatią myślową, znieczulającą mózg polski na wszystkie sprawy, które się bezpośrednio jej bytu nie tyczą, — da się wytłomaczyć ta obojętność, to wyczekujące stanowisko w kwestji języka międzynarodowego.

Jakkolwiek dalecy jesteśmy od tego, ażebyśmy utrzymywali, iż życie nie zna spraw ważniejszych od omawianej przez nas kwestji, to jednak szczerze wierzymy, iż pomyślnie rozstrzygnięcie tej sprawy przez ogólne przyjęcie języka pomocniczego we wszystkich dziedzinach życia, w których się dzisiaj z językami obcymi spotykać musimy, — przyniesie Polsce i to właśnie Polsce nieobliczalne korzyści.

Dotychczasowy stan sprawy esperanckiej u nas nie dorównywał rozwojowi esperantyzmu w innych krajach. W tym samym czasie, gdy na Zachodzie, w Ameryce, a nawet w Azji, esperantyzm nabierał coraz wyrazistszych rysów i zaznaczał swe życie coraz żywszym pulsem — w Polsce podobnym był do pięknej, ale nikłej roślinki, która, jedynie dzięki staraniom garstki jej wielbicieli, utrzymywała się

przy życiu i teraz dopiero poczęła objawiać tendencję do bardziej silnego rozrostu.

W chwili obecnej jednak esperantyzm w Polsce wstępuje w nowy okres. —

Odbyty w Krakowie ubiegłego lata VIII-my międzynarodowy kongres esperantystów uważać należy za hasło do bardziej wydajnej, bardziej szerokiej akcji. Początek zrobiony. Teraz od nas samych zeleży nadać ruchowi temu odpowiednią siłę. Chwila jest przełomowa. We wszystkich krajach, gdzie tylko odbyły się poprzednie kongresy esperanckie, rozwój Esperanta przybierał rozmiary gwałtowne. Jesteśmy pewni, że to samo zaznaczy się i u nas. Czyliż Polska, jako kolebka esperantyzmu, miałaby stanowić w tym wypadku smutny wyjątek? Dotychczasowy stan sprawy potrafiliśmy sobie objaśnić, nie umielibyśmy jednak zrozumieć, gdyby stan taki trwać miał i nadal.

Odtąd — miejmy nadzieję — praca pionierów esperanta w Polsce znajdzie lepsze dla siebie warunki. Łódź esperantyzmu, kierowana argonautami, wierzącymi w zwycięstwo i cel swej wyprawy, pomknę zapewne szybciej niż dotychczas.

I w jakichkolwiek łódź ta znajdzie się warunkach, wśród sprzyjającej pogody, czy na grzbietach wzdymanych burzą fal morskich, przy słońcu, czy też przy gromach zimnego stalowego nieba — nie ulękną się śmiałkowie ci żadnych przeciwieństw, nie zadrzą przed żadnym niebezpieczeństwem, nie zwątpią ani na chwilę w zwycięstwo, jakie ich czeka po dopłynięciu do celu, — gdyż prowadzi ich silna wiara, dobro ojczyzny i głębokie przecucie szczęścia, płynącego z braterskiego zrozumienia się ludów.

Zygmunt Greffkowiec.

## Opinie.

*Profesor Odo Bujwid*, słynny baterjolog Krakowski, prezes komitetu organizacyjnego VIII kongresu esperantystów w Krakowie.

„Mistrz mój i przyjaciel, sławny Pasteur, wyrzekł te pamiętne słowa: Jeżeli wiedza nie ma ojczyzny, każdy uczonej winien ją posiadać. Przystosowując te słowa do naszych dążeń, możemy zaznaczyć, że o ile język międzynarodowy niema ojczyzny, o tyle każdy

jego zwolennik winien być wiernym swojej. Każdy powinien ukochać ziemię rodzinną, a każdy może tego dowieść na swój sposób. Nie jest to jednak przeszkodą do pracy dla dobra wspólnego całego społeczeństwa.

Dziś można sobie łatwo wyobrazić jak dalece stosunki międzynarodowe będą ułatwione z chwilą, kiedy społeczeństwo zrozumie potrzebę języka międzynarodowego.

JULJUSZ SŁOWACKI.

## La Patro de Pestuloj.

Al sia unua majstro en Esperanta poezio, al la unua pli talenta tradikinto de ĉi-suba poemo, S-ro Antoni Grabowski, sian modestan tradukon dediĉas admiresprime la tradukinto.

*Trifoje luno la ora alternis,  
De kiam tendojn sur sabloj mi sternis.  
Infan' malgranda de panjo nutrita,  
Krom ĝi tri filoj, tri miaj filinoj,  
Famili' tuta nun enterigita  
Kun mi alvenis. Mia kamelaro  
Iradis ĉiam je sabloj senfinaj  
Manĝi kalamon sur bordo de maro;  
Vespere ĉiuj kuŝiĝis en rondo,  
Kie de fajro ne estas plu briloj.  
Kun kruĉ' filinoj iradis al fonto,  
Ŝtiparon fajran dismetis la filoj,  
Edzin', kun ido ĉe brusto, kuiris.  
Ĉion ĉi-tion de mi tomb' elŝiris,  
Kiu reridas al sun-radiulo.  
Ĉio nun kuŝas sub Ŝeĥa kopulo.  
Kaj mi revenas sola—ho turmentoj!  
Trifoje kvardek vivinte jarcentojn,  
De kiam venis al mia tol-korto.  
Dum kvarantano anĝelo de l' morto.*

*Ho, kiu konas doloron titanan,  
Kiu fermiĝas nun en koro mia!  
Mi iras reen en hejmon Libanan;  
Diros oranĝa arb' en korto nia:  
Maljunul', kie estas infanetoj?  
En kort de miaj filinoj floretoj  
Diros: kaj kie filinoj, maljuna?  
Libana nubo min demandas suna  
Pri la edzino, filoj forlasitaj,  
Pri idoj—ĉiuj—nun enterigitaj,  
Tie en tombo funebra de Ŝeĥo.  
Kaj ĉiu tiam min demandas eĥo,  
Ĉu mi sukcesis kun sano reiri?  
Kaj ĉiuj homoj... Kion tiam diri?*

*Mi venis. Tendon sur sablon mi metis.  
Kameloj miaj kuŝiĝis silente:  
La infaneto al paseroj ĵetis  
Iun manĝaĵon: tiuj diligente  
Manĝis, saltante preskaŭ sur la manon.  
Vidu riveron tiun diafanan.  
De ĝi revenis plej juna knabino  
Kun kruĉ' sur kapo, rekta kiel pino.  
Venis al fajro kaj ĉe ties brilo,  
Ridante gutojn sprucigis je ĉio.  
Fil' plej maljuna kun flam' en pupilo,  
Prenis la kruĉon per man' sekigita*

*Kaj diris: Dio vin pagos por tio,  
Ĉar mi soifas fajre, kiel besto.  
Dirinte tion, li trinkis ĝis resto,  
Kaj falis kvazaŭ palmo dehakita.  
Mi venis — estis malfrue lin savi.*

*Fratino volis por kisoj li havi:  
Frenez-minacis mi per la ponardo,  
Kaptis kadavron kaj ĵetis al gardo,  
Ke ĝi lin prenu sur feran prenilon,  
Kaj kun pestuloj metu mian filon.  
Kaj de ĉi nokto plena je sort-sagoj  
Estis signitaj novaj kvardek tagoj.\*)*

*La saman nokton Hafne kaj Amino  
Mortis, kuŝante sur lit' silenteme.  
Kaj tiel ambaŭ mortigis senĝeme,  
Ke, kvankam post de filo mia fino  
Dormo konsolon al mi ne alportis,  
Sed mi ne aŭdis kiel ambaŭ mortis.  
Kaj eĉ patrino ne aŭdis ilia  
Kvankam ne dormis ŝi dum nokto tia.  
La bluiĝintajn matene ĝis resto  
Ambaŭ filinojn tuŝitajn de pesto  
Mi eltrenigis el sub la kurteno:  
Kaj ili lasis nin! — kaj sen reveno!..  
Kaj kiel decas al inoj plenjaraj,  
Teron al patro balais per haroj.*

*Vidu ĉi sunon en ĉiela klaro!  
Ĉiam levigas ĝi post la palmaro,  
Ĉiam subiras post ĉi sabla bulo,  
Ĉiam ĉi blua ĉiel' sen makulo.  
Sed tiam ial ŝajnis al mi, plora,  
Ke sunon—suno ne similas ora.  
Kaj jam alia ol suno ĉiama,  
Sed kvazaŭ iu sun-vampiro flama,  
Ĉielon, kiu rigardis je morto  
De miaj idoj, tuta familio,  
Mi pensis tiel nubara kaj forta  
Pro nub' ĉiela, vaporoj el subo,  
Ke mi ne sciis, ĉu preĝo al Dio  
Penetros dum li sin ŝirmis per nuboj.*

*Dek tagoj ree pasis sur sablaro.  
Rest' de infanoj vivis — tuta kvaroj.  
Edzino mia estis pli trankvila,  
Eĉ infaneto mia plej subtila*

\*) La homoj, haltigitaj en la kvarantano, rajtas veturi pluen nur se dum 40 tagoj mortos nenlu el ili.

*El mond' ne volis burgone foriri:  
Kaj mi komencis jam fine re-spiri,  
Ĉar mi ne kredis, ke preninte trion,  
Di' volus preni tutan familion.*

*Ah! Do ĝi estis hor' infere puna  
Kiam sur vangoj de filo plej juna  
Mi vidis morton. Mi lin tiel gardis!  
Signel' sur lipoj ekaperis iu;  
Neniu vidus; mi tiel rigardis!  
Li fariĝardis simila al tiu  
Kadavr' de mia infano unua,  
Antaŭe pala, poste ruĝa, blua...  
Jen sur vizago makula etendo,  
Do mi ekkriis laŭte: mort' en tendo!  
Kaj ek'aptinte lin kun leproj tlaj  
En stepon portis kun kameloj miaj,  
Ke mort' lin tie sufoku ĝis fino  
Kaj por ke tion ne vidu — patrino.*

*Apud mortanto ni sidis senbruaĵ  
Mi kun kameloj, ĉiuj surgenuaĵ.  
Mi tordis brakojn kaj kriis turmente:  
Se li ne mortus! aŭ se ne naskiĝus!  
Kaj tie super palm', indifere.  
Dum mortis filo, lun' pala leviĝis  
Kaj vldis — devos ĝin pens' ĉiam gardi.  
Sed kiel povis eĉ luno rigardi?  
Kiam sur mia patra brak' li mortis,  
Mi la kadavron sur fajrujon portis.  
Sed kiam vesto ekbrulis fajrere,  
Mi lin elŝiris, jetis al gardistoj.  
Kaj lin forportis du nigraj tombistoj,  
Ke kun gefratoj li kuŝu prefere.  
De tiu horo plena je sort-sagoj  
Estis signitaj novaj kvardek tagoj.*

*Sub rond' de suno fajre bruligita,  
Kaj sub tend' mia de pest' infektita,  
Ni vivis, vorton al ni ne dirante,  
Antaŭ mem morto ŝajnigante morton —  
Ke grandan Dion ni trompos, pensante,  
Ke pest' - inkubo lasos nian korton.  
Revenis tamen anĝel' de doloro!  
Sed li min trovis sen larm' kaj sen koro  
Jam svenigitan pro doloro tia,  
Kaj jam dirantan: ĉion prena Dio!  
Kaj je suferoj de fil' mia tria  
Kor' estis ŝtona, oku' sen larm' ia.  
Dolor' jam estis ĉiutaga pano.  
Fil' agoniis pro pesta malsano,  
Fil' el infanoj la malplej ami'a,  
Kaj post la morto la malplej plorita.  
Sed lin pro tio rekompencis Dio,  
Donante morton kvazaŭ el glacio,  
Sen ia ĝemo, sen ia sufero;*

*Mortis, ŝtoniĝis, iĝis kvazaŭ fero.  
Mort' trajton tiel terure kuntiris,  
Kvazaŭ li plendojn niajn ne deziris,  
Sed sian volis aspekton alligi  
Al niaj koroj malvarmaj kaj igi,  
Ke en gepatra memor' ĉiam restu  
Trajtoj, kriantaj: malbenitaj estu!*

*Mi tiam pensis — ho sufer' de pesto! —  
Se ne pardonos Dio al la resto,  
Se la anĝelo de morto revenos,  
Infanon mian kaj patrinon prenos:  
Mi malfeliĉa sekvi ilin devis...  
Filin'! pri tiu mi neniam revis!  
Pri ŝi ne mordis min penso malhela.  
Ah, ŝi ja estis juna! tiel bela!  
Tiel gajeta, kiam kapon mian  
Por freŝig' metis sur manon lilian;  
Kiam volvante la silkan fadenon,  
Ŝi ĉirkaŭ cedro kuradis ĝojkore,  
El arb' farante por si la bobenon.  
Jen! kaj ĉi zonon brilantan kolore  
Ŝi faris. Mian okulon multploran  
Ŝirmante, metis hararon ŝi oran  
Tiel, ke vidis mi ŝin tra hararo  
Kvazaŭ rozeton tra suno kaj larmo.  
Ah, ŝi ja estis mastrin' de l' tendaro!  
Ŝi, al anĝelo simile, kun ĉarmo  
La plej malgrandan infaneton lulis;  
Ŝi kuris, kie ŝin ploro postulis,  
Ŝin suferigis nia sufer' ĉia'  
Kaj niaj larmoj falis je kap' ŝia.  
Kaj dek tagnoktoj pasis — longaj tiaj,  
Ke mort' jam povus forflugi el tero.  
Kaj dek tagnoktoj forpasis aliaj  
Pasis — komencis rebrili espero...  
Temp' kvietigis la plorojn infanajn,  
Kaj tridek tagojn kalkulis ni—sanaj.*

*Iam forlasis min pensoj kaj forto,  
Nokte ekdormis mi per dorm' de morto.  
En sonĝ', ŝirmitaj per nuboj sen finoj,—  
Aperis miaj du mortaj filinoj.  
Ili alvenis la mano ĉe mano.  
Min salutinte per pac' de Nirvano,  
Ili foriris okule - brilantaj  
Viziti tiujn — en tendo dormantajn.  
Kaj ili iris mallaŭte, kun klino  
Super la lit' de l' infan', de patrino;  
Kaj poste metis la duo sovaĝa  
Manojn je mia filin' malplejaĝa  
Mi saltis kun kri': malben' je ilia  
Kap'! kaj sovaĝe: Hatfe, Hatfe mia!  
Mallaŭte venis ŝi, kiel aŭroro;  
Ĉirkaŭpreninte, ŝi kvieton portis,  
Ĉar konvinkiĝis mi, ke ŝi ne mortis,*

*Sentante koron ŝian sur la koro,  
Sed sorto devis morgaŭe min moki —  
Hatfe!!! — sed kial doloron revoki?  
Kaj ĉi infanon rabis mort' furia,  
Kaj ĉi filino mortis sur brak' mia!  
Kaj estis unu moment' plej terura,  
Kiam ŝin mordis doloro tortura  
Ŝi kriis: patro, ho savu min, savu!  
Kaj diskliniĝis la roza buŝeto,  
Simile kiel ekfloras roz' rava.  
Kaj tiel mortis mia filineto,  
Ke mia koro ŝiriĝis sen vorto:  
Anĝele bela ŝi estis — post morto!*

*Venis gardistoj al ĉi-tiu loko  
Rabi la korpon al patr' senkonsola.  
Kaj, neatentaj, alkroĉis per hoko;  
Hok' alkroĉiĝis je mamu malmola  
Jen... ilin, kiel min, ne tuŝu pesto!  
Ili ŝin ŝiris — en mia ĉeesto!  
Tion memoru, Dī, en ĉiel-klaro...  
Mi mem ŝin prenis, portis al tombaro.*

*Kun krucumitaj manoj kaj sen klino  
Tri tagojn sidis senmova patrino  
En tend-angulo, flava, kvazaŭ ligna.  
L' infano iĝis pala kaj rezigna,  
Ĉar en patrino mamu lakt' sekigis.  
Nun en lulilo ofte plor' aŭdiĝis.  
Kaj ĉi dezerto — sen idaro mia! —  
Al ci ĝi ŝajnas ja certe alia,  
Eble orbrila, hela, gajsomera  
Por mi ĝi estas ebenaŭ infera!  
Tra la dezerto, trans sablojn enuajn  
Oni fortrenis la kadavrojn bluajn...  
Kaj tie, kie ondoj eĥon vekas,  
Por ci la maro bruas, por mi blekas;  
Kiam kun vento al bord' ĝi ne kuras,  
Por mi ĝi ploras, por ci nur murmuras.*

*Kaj ĉiutage dum vesper-sereno  
Al mi aŭdiĝis voĉ' de muezeno:  
Kvazaŭ li mian ekkomprenus sorton,  
El brust' li tiris pli malgajan vorton,  
Kriante nokte en la mallumecon  
Al malfeliĉa patro — Di-grandecon.  
Āl Vi saluton, ĥo Allah reĝanta!  
Per bru' de flamo, urbojn cindriganta!  
Per for', fajrspirajn kreanta vulkanojn,  
Per pesto, kiu mortigas infanojn,  
Prenante idojn el sub patrin-koro...  
Ho Allah, Akbar Allah, al Vi gloro!*

*Kio nur havis vizaĝon de homo,  
Ne plu alpaŝis al mia tol-domo.  
De mia tendo — ĝin faris filinoj! —*

*Pro roso nigraj, pendis tolo-finoj,  
Disŝirigintaj, vente plen-blovitaj,  
Kvazaŭ mort-tukoj de tomb forprenitaj.  
Nun tendon mian gardis pesta baro;  
Kaj ĉu ci scias? eĉ la paseraro,  
Kiu alvenis ĉi-tien afabla  
Por sin pan-nutri kaj bani en sablo,  
Kiam infanojn miajn morto prenis,  
De tiu tempo ĝi ne plu alvenis.  
Ĉu fortimigis ilin to' ŝirita  
De mia tendo? vizaĝ' pala mia?  
Sed plu alvenis birdeto nenia...  
Mi ĝin rimarkis — kun ploro spirita.*

*Kvin tagojn poste... ho, Dio, plej kara!  
Jam de vespero ondar' bruis mara,  
Kaŝiĝis rondo de suno-inkubo  
Kaj la ĉielon tutan kovris nuboj  
Venis nokl' (ĝin mi ĝis nun ne forgesis)  
Luma pro ruĝa fulm' kiu ne ĉesis.  
Ĝis nun mi sentas, kaj vidas, kaj aŭdas  
Kiel la pluvo sur tend' mia plaŭdas,  
Kiel lignaĵo de la tendo knaras,  
Al vent-atakoj kiel kontraŭstaras,  
Pro fulmoj kiel ĝi ruĝigas tuta  
Al ia flama tomb' simila muta.  
Kaj al mi ŝajnis en la huraganoj,  
Ke mi ekaŭdas voĉojn de infanoj,  
Ke ili krias per frostiga ĥoro.  
Do plistreĉiĝis vido, aŭdo, koro...  
Kaj kun teruro mi pensis pri mia  
Idar' — en tombo — kaj dum nokto tia!  
Subite... kial mort' tiel ŝtelpaŝe,  
Mallaŭte venas al tend' infektita?  
Fulm' falis brue post fulmo — subite  
Infan' ekploris en lulilo kaŝe.  
Sed terurige l' infan' ekploretis,  
Ĉar mi, patrino, ni ambaŭ nin jetis,  
Kie aŭdiĝis la kri' infaneta...  
Kvankam plor' ĝia estis tre diskreta,  
Tamen ĝi ŝajnis al ni tiom ĝema,  
Kaj tiom laŭta, kaj tiom plendema,  
Kaj tiom el la interno ŝirita,  
Kaj tiel saĝa, tiel malbenita!!!  
Ke ni alkuris kun terur' en koro,  
Kaj sen espero jam, kaj sen memoro!*

*Kaj nin ne trompis la timo-ĉeesto!  
Mortis! pro sama, kiel tiuj, pesto.  
Ĝi iris kuŝi en aro gefrata  
Tiu-ĉi lasta, tiu plej amata!!!  
Ĝin de mi prenis senkompata morto.  
Ĝi ne revenos! ne kreskos je forto!  
Nek ĝin revidos iam ĝia tero!  
Ĝi ne revenos iam! — malespero!*

Nokl' venis. Brila pro steloj sen fino.  
 En tend' ni estis solaj — mi, patrino.  
 Sur tablo kuŝis l' infan' unu-nura,  
 Per senmoveco de morto terura.  
 Ĝin rigardinte, mi eksentis tiam  
 Ke se ĝi povus resti kun ni ĉiam,  
 Tra ĉiuj jaroj — se eĉ morta tia, —  
 Dolor - duono irus el kor' mia...  
 Kaj nun l' infanon kiu laste mortis,  
 Nek la gardistoj, nek mi el tend' portis.  
 Kie tombeja malfermiĝas sino,  
 Sed ĝin forportis tien mem patrino.

En tend' malplena edzin' kaj mi restis.  
 Sed ĉu ci scias? anstataŭ kunigi,  
 Sufero, kiu en brustoj sin nestis,  
 Komencis ian venenon eligi.

Nur eble Dio ĝin pelos el koro.

Malamon nia similis doloro;

Ĝi staris granda inter senkonsolaj

Ni. Disigitaj ni estis kaj solaj.

Ni eĉ ne povis vorton al ni diri,

Ĉar kio povis la silenton ŝiri

En tend' malplena inter mi, edzino?

De mortaj idoj patro kaj patrino?

Suno leviĝis ruĝega pro varmo

Kaj redronadis ĝi kie post larmo

Nuba ĝi dronas torĉon similante.

Tiel ni vivis senidaj — konstante,

Granda silento en tendon enkuris,

Nur iam muso sur planko susuris,

Pli bru' nenia silenton frakasis.

Kaj tiel tiuj kvardek tagoj pasis.

Kaj tiam venis kvarantan - doktoroj

Por de ni ambaŭ atenta esploro.

Kaj tiujn homojn kaptis pens' surpriza

Ĉar kliniĝinta mi estis, hargriza:

Kaj edzin' mia pro nedorm', ĉagreno,

Iĝis simila al flava sukceso.

Sur kapo ŝia brilis kron' grizhara,

Sur vangojn venis ruĝeco malklara

En vid' ŝi havis fulmojn kiel homoj

Je sun' venintaj el subteraj domoj.

Artikojn frapis doktor' kvarantana,

Kien unue enŝteligis pesto.

Kaj ĉu ekkredos ci: mi estis sana!

Mi, kiu kisis kadavrojn ĝis resto,

El kvarantano seninfekta venis:

Ŝi, kiu mane duonon ne prenis,

Sin ekfrapinte super brust', kun tremo

Lalte ekkriis — kaj falis kun ĝemo.

Virinan korpon mi prenis sur manoj,

En tenden portis — kaj jetinte ŝarĝon

Senpensa falis sur dezerton larĝan,

Kaj revekiĝis — por nov - kvarantanoj.

Antaŭ la morto patrin' al mi diris,

Ke el la tombo infana deziris

Ŝi memorajon, ŝtoneton aŭ floron,  
 Haron el oraj sur kapo ringetoj;  
 Tiu postmorta infan - rememoro,  
 Jen! Bild', ĝi, kiun tenis en manetoj,  
 Ĉi oraj haroj nun tiel meritaj  
 En tomb' el kapo infana prenitaj —  
 (Ĉar la patrino havis tian forton  
 Elfosi nokte la infanon mortan:  
 Ĝin ne atakis de l' putrad' ektuŝo  
 Do ŝi ĝin kisis je l' korala buŝo,  
 Kaj ĝin redonis al la subteraĵo...)  
 Tiu - ĉi kiso kaj ĉi memoraĵo,  
 El Ŝeĥa tero ŝtelita avara  
 Ŝin ankaŭ prenis al hejmo tombara.

Denove brusto de l' sabl' sin disŝiris,  
 Kien patrin' de l' mortintoj foriris...  
 Kaj mi revenis al mia tol - nesto  
 En ĝi min kaŝi kiel nokte besto.  
 Nek mi la sunon kiu alte ridis,  
 Nek min la homoj sur stepo ekvidis.

Mi infaniĝis en la maljunaĝo.

Antaŭ mi estis neniuj vizagoj,

Krom tiuj kapoj blu - palaj, malhelaj,

Kiujn forrabis de mi mort - anĝeloj.

Dum tago blua dum nokta malklaro

Ili ĉeestas en mia tendaro,

Ni kunparolis. Al mi venis vortoj,

Por interŝanĝi ilin kun la mortaj;

Kaj strange: ofte aŭdigadis tia

Voĉ', kiu estis voĉ' de ido mia.

Min ofte vokis el ĉi sonĝo ruĝa

Dum nokl', hiena voĉ' terure muĝa

Ĉe tomb'... Mi aŭdis kun mort' en okuloj:

Sur korpoj ploris kadavro - manĝuloj.

Mi iĝis kiel malvarma serpento,

Tagoj, semajnoj forpasis sen sento,

Sen ia penso, doloro, revoko,

Malmola iĝis mi kiel ŝtonroko...

Kaj jen... — De Dio zorg' super mi restis! —

Jen en la tendon iu enrigardis;

Sed ne de homo kapo ĝi jam estis:

Okul' de mia kamelo ekardis.

Kaj ĝi rigardis min tiel kompate,

Ke mi infane ploris netenate.

Tiel mi lasis kvardek tagojn pasi.

Alvenis homoj por min liberlasi...

Liber', maldolĉa pli ol la atendo!

Mi kutimiĝis al malluma tendo;

Ho, kia skuis min granda teruro

Dum elŝirado de kojnoj kaj ŝnuro,

Kiujn mi... (Dio min ne ekkompatis! —)

Kun la idaro en sablon enbatis.

Di', helpu ŝiri, mi nun estas sola;

Eble rakontos al ci tendo tola

Per bru' funebra malesperon mian?



*Ĝi ĉion scias, ĝi ja vidis ĉion!  
Ĉu ĝi ne donis al sufer' protekton?  
Vidu ĝin, tuŝu, ne timu infekton,  
Ne timu morton, kiu per blu-brilo...  
Ci ja ne estas, filo, mia filo!  
Sed ne! forkuru! mi scias: de tera  
Hom, ĉiu estos ĉi tend' timegata.  
Morto pro pesto? estas mort' infera,  
Fremda fariĝas por ci vizaĝ' frata,*

*Poste vin brogos flam' en ĉiun lokon.  
Ah! mi ja vidis tiel mian okon!  
Ĉiam vidante tiujn mortigatojn...  
Mi tie vivis tutajn tri monatojn...  
Kaj nun — jen naŭo da kameloj splenaj  
Kaj oksur ill pakajoj malplenaj  
Al mi nun restis nenio, krom Dio,  
Jen tomboj miaj — kaj jen vojo mia.  
Tradukis Czesław Kozłowski.*

## Edziga kanto de l'najtingalo.

(El kartvela poeto Vaja Pŝavala).

*Gloron al vi, reganto la ĉiela!  
Al forto de l' naturo sonu glor'!  
Gloron al vi, ho fianĉino bela,  
Kaj al fianĉo en edziga hor'!*

*El amo plektos mi por ambaŭ kronon,  
Bel-ornamita estos ĝia rond':  
Mi malavare ligos ĉian bonon,  
Trovitane ie en la vasta mond'.*

*Sincere dediĉita violfloro  
Por gefianĉoj estu kap-ornam';  
Ĉar ame batas ankaŭ mia koro,  
Do ĝin flamigas via granda am'.*

*Karesa senf', liganta feliculojn,  
Allogas niajn korojn kaj okulojn.*

Esperante versigis A. Grabowski.

## El Japanaj utoj.

Kobieta

*Kobieta — czar, kobieta — kwiato,  
Jasny chryzantem szarej ziemi,  
Wiec czcij i chwalbę czyń jej rad  
Kobieta — czar, kobieta — kwiato...*

*Ona jak słońca blask, co padł,  
Gdy zechce, życia mrok odcieni —  
Kobieta — czar, kobieta — kwiato,  
Jasny chryzantem szarej ziemi.*

z japońskiogo  
Remigjuż Kwiatkowski

Virino

*Virino — ĉarm', virino — flor',  
Hel-krizantem' sur tero griza, —  
Do gloru ŝin per danko kor', —  
Virino — ĉarm', virino — flor'...*

*Ŝi estas sunradia or',  
Ĝojdona lumo paradiza —  
Virino — ĉarm', virino — flor',  
Hel-krizantem' sur tero griza.*

el pola traduko  
esperantigis ...  
Antoni Stankiewicz.

## Scienco kaj vivo.

Ŝanĝo de flor-koloroj. Estas konate, ke floroj, kreskantaj en ombro, koloriĝas pli forte; se ili kreskas je la suno; kaj floroj, kreskantaj ordinaro je la suno, lokigitaj en ombro, malfortigas sian koloron. Tiamaniere, la ŝanĝon de ilia koloro kaŭzas la forto de lumo; depende de tio, kie kreskas tiuj ĉi floroj — je la suno aŭ en ombro — ŝanĝiĝos ankaŭ ilia koloro. Estas tamen karakterize, ke tiun ĉi koloron oni ne povas ofte ŝanĝi ĉe la sama floro.

Same povas influi koloron de floroj la temperaturo. La miozotoj, ekzemple, kiujn oni tre multe plantas vintre, en malvarma ĉambro, ĉe 5 — 7°, estas ruĝkoloraj; transportitaj en ĉambro varman, ĉe 10 — 15°, la floretoj akiras bluetan violkoloron, iam eĉ pale-bluan. Se la saman miozoton, kiu ĉesis flori en varma ĉambro, oni transportas en malvarman ĉambro, ĝi tie ĉi donos novajn florojn, sed jam ruĝkolorajn, sed en varma ĉambro ĝi ree jam ne floras. En ĉambro malvarma floroj kon-

servas ruĝan koloron, ĝis kiam la temperaturo kun alveno de printempo ne komencos plialtiĝi. Ĝis tiu tempo restas ruĝkoloraj nur la burĝonoj; sed la malkovritaj floroj blukoloriĝas. La kaŭzo de tiuj-ĉi ŝanĝoj de la florkoloroj ne estas ankoraŭ sufiĉe studita, sed ĉiu-okaze, ĝi interligiĝas kun pli intensigita spirado de kreskajoj ĉe temperaturoj malaltaj, kies rezulto estas la ruĝkoloro de floroj. Tio ankaŭ, kompreneble, klarigas la ruĝkolorocon de floroj aŭtune.

**La antisepta rolo de salo kaj sukero.** La fama franca scienculo Linde opinias, ke la antisepta rolo de salo kaj sukero klariĝas per tio, ke en koncentritaj salaj kaj sukeraĵaj solvaĵoj, mikroboj, lokigantaj en ili, perdas kelkajn de siaj elementoj, fariĝas pli malfortaj kaj malpli kapablaj por multiĝi.

Linde okupis sin per mikroboj de fermento, kiujn li lokigis por 24 horoj en solvaĵoj de sukero kaj salo, kaj la kompakteco de solvaĵo atingis: de sukero — ĝis 80%, kaj de salo — ĝis 8%. Dum sia estado en tiuj-ĉi

solvaĵoj, la ĉeloj perdis grandan kvanton de siaj diversaj elementoj, nome: azoton, karbacidan kallon kaj aliajn, kiujn Linde poste trovis en filtrita fluidaĵo. La ĉeloj ŝajnis sub mikroskopo esti malgrasiĝintaj: krom tio, ankaŭ la disvolvo ilia poste estis tre malrapida, — kaj pli malrapida, ju en pli densa solvaĵo ili troviĝis.

**La temperaturo de lafo.** La temperaturaj mezuradoj de lafo estas farataj ĝenerale tre malofte kaj distingiĝas, pro certaj kaŭzoj, per grandaj malprecizecoj. Pro tio des pli interesaj prezentiĝas la esploroj en tiu ĉi direkto de prof. Platanio, dum la erupcio de Etno en septembro de la pasinta jaro.

Li esploris torenton de lafo, eliĝinta el la malsupra kratero kelkajn tagojn antaŭ la plena finiĝo de l' erupcio. Montriĝis, ke en la lokoj, kie la lafo estis ankoraŭ ruĝa, la temperaturo atingis 795°, en kelkaj aliaj lokoj ĝi aliris eĉ ĝis 940° — de maksimuma temperaturo, kiun Platanio havis okazon observi.

J. V — IĈ.

## Konsideru!

La homo ne komprenas la vivon kaj volas scii, kio estas la morto.

*Konfucius.*

Ni ne povas eltiri eĉ unu folion el nia vivo kvankam ni povas jeti en fajron la tutan libron.

*Sand.*

La homa vivo komenciĝas per krio, finiĝas — per ĝemo.

*Zafir.*

Homo feliĉa estas nur tiu, kiu povas la finon de sia vivo ligi kun la komenco.

*Goethe.*

Kiam mia domo brulas, varmigas sin dume la najbaroj.

Sur la granda mond-scenejo egoismo estas la sufloro.

*Buast.*

La infaneco montras la homon, same kiel mateno — la tagon.

*Milton.*

La vero apartenas al homo, eraro — al tempo.

*Goethe.*

Diru al mi vian estintecon, tiam mi diros al vi la estontecon.

*Konfucius.*

La majo de l' vivo floras nur unu fojon.

*Ŝiler.*

La edziĝo estas kvazaŭ sieĝita fortikajo: kiu estas ekstere — volas eniri; kiu sin trovas interne, volas eliri.

*Araba proverbo.*

En amo oni perdas la prudenton, en edziĝo oni rimarkas la perdon.

*Zafir.*

Kolektis J. Voleviĉ.

## Diversaĵoj.

### Kiel ripozi.

La scipovo ripozi estas unu el la sekretoj de beleco kaj longdaŭra vivo.

Ripozo ne signifas senokupecon; ĝi estas sole nur interrompo en la agado de niaj sentoj kaj organoj, plifreŝiganta ilin kaj donanta al ili novajn fortojn por laboro. Eĉ la plej okupata homo povas dum la tago almenaŭ dekfoje dediĉi kelkajn malgrandajn momentojn por ripozo.

Jen kiamaniere:

Antaŭ ĉio ni devas zorgi pri la okuloj kaj ni fermu ilin veturante en veturilo aŭ traŭmo.

Skribate, kudrante aŭ desegnante, ni ĉesigu, aboron por kelkaj sekundoj kaj fermu la okulojn.

La plej necesajn okupojn oni povas interrompi de tempo al tempo. Ni donacu al ni kelkfoje dum tago kvin minutojn da ripozo kaj trankvilo, ni malfermu fenestron kaj spiru malrapide, profunde.

Se ni povas dediĉi por matenmanĝo nur duonon da horo, ni uzu kvaronon por malgranda promenado. Glaso da lakto kun bulko ĉe movado estos pli utila por sano, ol abunda nutraĵo post kiu ni restas senmove.

Almenaŭ kvaronon da horo ni kuŝu en mal-luma kaj pur-aera ĉambro penante ekdormi.

Ni kuŝu surdorse, ĉar tiamaniere la korpo plej bone ripozas.

Se ni sentas nin nervigitaj aŭ incititaj, ni sangi la okupon. Nenio tiel bone influas je kvietigo de pensoj, kiel letero al alia persono.

Sed la plej ĉefa kondiĉo de ripozo estas dormo. Por bone dormi estas necese, ke temperaturo en la ĉambro estu modera kaj freŝa aero povu senbare eniri en ĝin.

### La progreso.

„La progreso estas terura besto: ĝi havas elektran kapegon, muĝas per lingvo Esperanto kaj moviĝas en aeroplanoj. En la okuloj, du pecoj da radiumo disjetas fajrerojn en tutan mondon. Anstataŭ oreloj ĝi havas telefonojn, sur la kapego ĝi portas la pinton, nomatan *anteno* por senfadena telegrafo! El naztruoj kaj buŝego eliĝas fulmoj, fumo kaj vaporoĉ. En maldekstra mano ĝi tenas faskon da Roentgenaj radioj kaj en la dekstra — korbon kun mikroboj... Pli maljuna frato de progreso, iam malkontenta, nesatigebla, egoismo — interbatalas, sed kiu el ili venkos?..“

El la libro de W. Jaglińkowski „En la lando de boksisoj“.

Trad. Roman Kamiński el Kolomyja.

## Scio estas potenco!

La plej granda trezoro, la plej efika armilo de la homo — estas *la ĝusta mondkompreno*, la kompreno de ĉiuj gravaj faktoj kaj aperoj, okazantaj aŭ jam okazintaj en la mondo. La homa individuo, vivanta sole per besta vivo, vekanta en si neniajn noblajn sentojn, fremda por ĉiaj idealoj — ne meritas la nomon homo.

La tasko de la „Esperanta Scienca kaj Literatura Libraro“ estas per kolekto da malpli grandaj libroj el ĉiuj regionoj de la scio, aŭ per pli ampleksaj verkoj kaj facile kompreneblaj sciencaj priskriboj veki la homan konscion en ĉiuj direktoj kaj aperoj de la vivo, partopreni en la disvastigado kaj profundigado de la homa mondkompreno.

Samideanoj! Ĉu nia literaturo longe ankoraŭ devas servi al esprimado de belsonaj frazoj kaj subtilaj parolturnoj? Aŭ ĉu prefere jam venis la tempo, ke ĝi fariĝu luma disportanto de ĉiuj utilaj kaj fruktodonaj ide-

oj — potenca batalilo kontraŭ ĉiuj nigraj fortoj kaj perfortoj, premantaj la mondon?!

Por almenaŭ en malgranda mezuro efektiviĝi tiun ĉi idealon, ni, subskribintoj decidis eldoni serion da libroj, kiuj per la sekvanta eco principe diferencas de similaj eldonaĵoj:

Ĉiu libro kostas tiom, kiom kostas ĝia preso.

Tiel aranĝita prezo ebligas al ĉiu libro la plej grandan disvastigon, ĝi ebligas ankaŭ al ĉiu samideano la plej efikan kaj malmultekostan propagandon.

Por la „Esperanta Scienca kaj Literatura Libraro“:

*Leopold Kronenberg, Emilo Pfeffer, Antoni Czubyński.*

Post alsendo de almenaŭ 1 Sm. (2 kronoj 40 haleroj en aŭstria mono) ĉiu grupo aŭ aparta samideano ricevos senprokraste kaj

afrankite kolekton da jam aperintaj libroj en amplekso de almenaŭ 640 paĝoj da teksto.

Ĉiuj mendoj kaj korespondajoj estu direktataj al *Antoni Czubyński*, Krakovo, Strato Retoryka 10. Aŭstrio - Galicio.

Samideanoj! Helpu al la sukceso de la

„Libraro“, helpu al la sukceso de la ideoj, kiujn ĝi proklamas!

Al la nova eldonajo, kies bezono estis tre sentata en nia esperanta literaturo, ni deziras plenan sukceson!

La Red.

## El Esperanta Mondo.

La migranta Esperanto - ekspozicio estas kolekto de ĉiuspecaj esperantaj verkoj, kiujn ni pruntedonas por 14 tagoj al iu ajn, kontraŭ pago de sendkostoj; kursoj, paroladoj kaj aliaj aranĝoj povos uzi la ekspozicion kun tre bona efiko.

La partoj de l' espozicio estas jenaj:

1. Klarigoj, 2. Instruajoj, 3. Gazetaro, 4. Literaturo, 5. Kiel Esperanto estas uzata (gvidlibroj, katalogoj, prezaroj), 6. Mondkorespondado. 7. Esperantistaro kaj ĝiaj aranĝoj (Kongresoj, institutoj, unuiĝoj, jarlibroj) 8. En fremdaj servoj (Poŝto, ruĝa kruco, pacifismo, blinduloj, kuracistoj).

Tiamaniere la espozicio estas tre bona okazo por konatigi novaĵojn, ne kaŭzante multajn kostojn, kaj ni petas niajn samideanojn, uzi tre ofte tiun servon.

Oni adresu: Esslingen a. N. (Germanujo).  
Virtemberga Esperanto - Instituto.

... Abtinentuloj, atentu!

Por disvastigi Esperanton inter la diversaj abstinentuloj kaj vivreformuloj per helpo de la diversaj bontemplanaj loĝoj kaj aliaj unuiĝoj kiuj agadas laŭ konformaj celoj kreis S-ro *G. Brockhof*, *Bomlitz*, (*Hannover*), *Germ.* (Membro de la granda ordeno de la Bontemplanoj) novan gazeton, „La Internacia Abstinenta Observanto“ — jarabono: 1,59 ₰. Ni sincere petas ĉiujn samideanojn, ke ili bonvolu atentigi kaj instigi ĉiujn personojn, loĝojn, unuiĝojn k. t. p. kun konformaj celoj, ke ili abonu la gazeton, aŭ postulu kondiĉojn por varbantoj kaj perantoj de la eldonejo. Al demandoj oni devas aldoni respondkuponon.

Stenografistoj! — Nia afero ĉiutage kreskas en Germanujo. La registaro komencas enkonduki nian lingvon en la lernejojn, sed ĝi nun ankaŭ volas scii, ĉu Esperanto taŭgas por sciencaj aferoj. Ĉu oni komisils kelk-

ajn reĝajn asesorojn provi la helplingvon. Ankaŭ mi estas unu el tiuj reĝaj asesoroj kaj tial petas Vin, helpu min kaj montru, ke per nia lingvo estas eble ricevi sciigojn el la plej diversaj landoj.

Nia reĝa muzeo bezonas la jenajn informojn:

- 1) Ĉu oni uzas *la stenografion* en Via lando? Laŭ kiu sistemo? Ĉu ekzistas stenografiaj grupoj? Ĉu Vi ion scias pri stenografio en Via parlamento? Ĉu oni lernas stenografion en lernejoj? Ĉu Vi povus doni kelkajn informojn pri la historio de stenografio en Via lando?
- 2) *Grava* afero estas antaŭ ĉio por ni, scii ĉu oni pri la *ordinara* skribo de la *enlanduloj*. Per kiaj iloj ili skribas? Ĉu Vi povus sendi al ni tian skribilon aŭ pli bone tutan skribilon? Ĉu oni skribas per plumoj, bambuoj, kalamoj aŭ penikoj? Aŭ per kio? Ĉu ili uzas inkon aŭ kion? Ĉu ili skribas sur papero aŭ sur plantaj folioj?
- 3) Kaj la *skribo*? Ĉu vi povus sendi specimemon de *enlanda* skribo? Eble gazeton kaj enlande skribitan leteron? Ĉu Vi povus sendi la alfabeton? Ĉu Vi povus iom priskribi la enlandan skribmanieron? La lastaj sciigoj estas tre gravaj por ni kaj specimenoj de skribo kaj skribiloj tre valoraj, ĉar ni povas ĉiam montri ilin, dirante ke nur per Esperanto ni sukcesis ricevi tiajn aĵojn.

Samideanoj! skribu baldaŭ kaj montru, ke Esperanto ion taŭgas. Se vi sendas specimenojn, mi petas, skribu, kiom da mono mi devas sendi kaj Vi tuj ricevos la monon. Estas ja ĉiuj specimenoj nur malmultekostaj aferoj.

Koran dankon por ĉiu helpo!

Salutas samideane.

D-ro Schramm, *reĝa asesoro*,  
*Dresden-Ständehaus*.

KAŻDY NOWY ABONENT „ESPERANTYSTY POLSKIEGO“ — TO KROK  
NAPRZÓD W ROZWOJU NASZEJ SPRAWY NA ZIEMIACH POLSKICH.

**Parolad-vojaĝo.**

Instigata per la sukceso de Mr. Parrish, parolanta pri Kalifornio en 250 diversaj urboj de Eŭropo, S-ro Prof. Aug. Pitlik en Praha III. (Bohem.) Jansky Vršek 3, decidiĝis entrepreni similan vojaĝon, celante atentigi pri la ĉefurbo de reĝolando Bohemujo. Tiu ĉi entrepreno estas favore subtenata de la tiea urbestro, komerca ĉambro, bohema nacia konsilantaro kaj bohema landa ligo por akceli la turisman movadon en Bohemujo, kaj trairos ĉiujn landojn de Eŭropo. La honorario por la parolado estas fiksita je 17 Sm., sed reklam-elspezoj, lupago, lumo kaj aparato dovos esti prizorgataj de la kluboj aranĝontaj la vesperon. In-

teresigantaj skribu S-ro Pitlik laŭ la supra adreso.

**Lingva Komitato.**

La Lingva Komitato Esperantista konsistas nun el 145 membroj: 27 por angla lingvo 4 por bohema, 1 por dana, 2 por finna, 3 por flandra, 41 por franca, 16 por germana, 11 por hispana. 3 por holanda, 4 por hungara, 1 por islanda, 6 por itala, 3 por kataluna, 6 por pola, 6 por portugala, 1 por rumana, 8 por rusa, 2 por sveda. De nun la anoj de la Lingva Komitato estos rebalotataj ĉiun 9-an jarojn, kaj la kandidatojn prezentos Esper. Societoj, Lingvokomitatoj aŭ aliaj Esp. Institucioj.

**Nekrologio.**

**Prof. Henri Dor.**

Eminenta profesoro, prezidanto de Tutmonda Esp. Kuracista Asocio (T. E. K. A.), la homo kun kristala koro, respektinda maljunulo, sed junule energia esperantisto foriris en eternecon, lasante post si grandan dolor-

bedaŭron kaj bon-memoron de ĉiuj, kiuj lin konis aŭ aŭdis pri liaj agoj.

En paco eterna ripozu la koro de la homo, kiu dum 77 jaroj de sia laborema vivo trapasis la viv-vojon bonkore kaj noble!

Al T. E. K. A. ni esprimas nian kondolecon.

**Pola Kroniko.**

**Pola Esp. Societo.**

Fine la malfacila demando pri la loĝejo de la Societo estas feliĉe solvita dank' al samideana sindonemo kaj afableco de S-ro *Władysław Kawecki*, filia direktoro de Frankfurta firmo „Veifa“, kiu tute senpage oferis por societaj vesperaj kunvenoj salonon de sia firmo, ĉe *Nowy Świat 38 log. 5*.

Jen estas la programo de Societa semajno anstataŭanta ĝisnunajn monatajn kunvenojn en „Urania“: *lunde* — legado de libroj kaj gazetoj; *marde* — kursoj de Esp.; *merkrede* — sekcioj; *ĵaŭde* — societa vespero, pruntado de libroj el la biblioteko; oni devas interparoli nur esperante; *vendrede* — kursoj; *sabate* — legado de gazetoj kaj libroj.

La societejo funkcias ĉiutage de la 8-a vespere.

La Komitato, volante ebligi vizitadon de la societo al personoj kiuj ial ne povas esti membroj de la societo (neplenaĝuloj, studentoj k.t.p.), decidis vendadi specialajn enirkartojn je prezo 1 Rb. jare; la enirkarto permesas al posedanto uzi societajn bibliotekojn kaj legi esperantajn gazetojn dufoje semajne: lunde kaj sabate. Ĉiuj kandidatoj, devas

prezenti du membrojn enkondukantajn ilin, ka fari deklaron, al la sekretario, kiu prezentos la deklarojn al la Komitato por balotado.

La Komitato kore dankas al D-ro Chybzyński, redaktoro de „Kuracisto“, al S-ro Günther kaj al aliaj por senpage oferitaj al la Societo Esperantaj gazetoj.

Ĉiuj membroj estas tre petataj pagi siajn nepagitajn kotizojn kaj redoni al la bibliotekisto, S-ro Kawecki, pruntitajn iam librojn.

De nova jaro ĉiu membro ricevos specialan membran karton.

**Kurso de Esperanto.**

Marde kaj vendrede de la 8-a vespere en la Societejo (Nowy Świat 38 l. 5) okazas esperanta kurso por komencantoj. La nova kurso komenciĝos 7-an de Januaro, 1913 jaro kaj konsistos el 12 lecionoj. La kurso kostas 3 rb.; por studanta junularo la prezo estas malgrandigata ĝis 1 rb.

Enskriboj akceptas Redakcio de „Pola Esp.“ (Szopena 8 log. 9 telefono 160-24).

\* \* \*

Ni konstatas malrapidan, sed konstantan antaŭeniron de nia afero en Polujo. La

gazetoj pli ofte skribas pri Esperanto. Ni legis bonajn artikolojn pri Esperanto en „Wolne Slovo“, „Prawda“, „Myśl Niepodległa“, „Kurjer Polski“, „Kurjer Kaliski“ kaj aliaj.

Samideanoj! Nur: „konstante, kuraĝe kaj neflankiĝante ni iru la vojon celitan!“

Ni tre petas samideanojn el provinco sendi al ni mallongajn raportetojn pri Esperanta movado en la provinco.

## Z ruchu esperanckiego.

### Francja.

**Paryż.** — Na bankiecie paryskiej grupy esperantystów byli obecni: członkowie akademji Nauk Adolphe Carnot; gen. Sebert, dwaj znakomici uczeni, astronomi: prof. Foerster i senator Brasegna, prof. Uniwersytetu w Rzymie, słynni awiatorzy-esperantyści, Henri Farman, Lorenc i Archdeacon. Przedstawiciele 8 narodowości wygłosili mowy.

— Pod przewodnictwem mera odbyło się zebranie sekcji przemysłowo-handlowej. Godność honorowych prezesów przyjęli senator Cornet i deputowany Godart, prezes parlamentarnej grupy esperantystów.

Na prezesa Esperanckiego Tow. Naukowego został obrany prof. berlińskiego uniwersytetu Wilhelm Foerster, na wiceprezesów: prof. Krak. Uniwers. Odo Bujwid, prof. Sorbony paryskiej. Cotton i dziekan Uniwers. w Limie (Peru), senator Villareal. Oficjalnym organem towarzystwa jest „Scienca Gazeto“.

Delegat Uniwers. Związku Esp. p. René Brisset w Royan otrzymał od Ministra Oświaty list gratulacyjny z powodu otwarcia nowych kursów Jęz. Esperanto.

— Na XII kongresie, „powszechnej konfederacji Pracy w Hawrze jednogłośnie przyjęto rezolucję na korzyść Esperanta.

— Na kongresie anti-tuberkulicznym postanowiono posługiwać się Esperantem w stosunkach międzynarodowych.

### Niemcy.

— Augsburgu Esperanto jest wykładanym w gimnazjach Św. Anny i Św. Stefana, a także i w szkole realnej.

— Jedna z większych Kampanji elektryczności „Neckarwerke A. G. Esslingen, utworzyła kursy esp. dla swoich urzędników.

— Wielka fabryka aparatów elektro-medycznych i Roentgena „Veifa“ we Frankfurcie nad Menem na skutek propagandy dyrektora swojej filji dla Król. Pol. i Rosji p. W. Kawckiego zorganizowała kursy Esp. dla swoich urzędników.

— W drezdeńskim instytucie fizycznym

baron von Eickstedt wygłosił odczyt o Esperancie.

**Austria.** W Cormons (pod Trjstem) na kursy Esp. zapisało się 187 słuchaczy.

**Anglja.** — W Blackpole odbył się kongres esper. federacji. Delegatów kongresu przyjął uroczyście prezydent miasta.

— Na statku wojennym „Orion“ zawiązało się tow. esp.

— W kolegjum Bedley w Bedales, znany propagator Edm. Privat zorganizował 16 kursów Esp. (14-dla studentów i 2-dla nauczycieli.)

— W ostatnim miesiącu z górą sto gazet angielskich zamieściło artykuły o Esperancie.

### Hiszpanja.

Na V międz. kongresie turystów w Madrycie jednogłośnie przyjęto rezolucję o Esperancie.

### Szwajcaria.

Na wszechświatowym genewskim kongresie Pokoju zawiązano nowe tow. esper.—pacyfistów (Adr. G. Chavet, 51 rue de Clichy, Paris.)

— W Genewie dzięki niestrudzojej propagatorce p. Biske powstał nowy klub esper. i za pozwoleniem rektora zorganizowano w Uniwerstytecie kursy języka. Zapisało się 300 słuchaczy i studentów, nauczycieli, księży, dziennikarzy, urzędników.

— Wiele gazet zamieściło przyjazne artykuły o Esperancie.

### Holandja.

W Rotterdamie powstało tow. esper. kolejarzy. Funkcjonuje siedem kursów esperanta dla tramwajarzy rotterdamkich, którzy utworzyli klub esperantystów — tramwajarzy.

### Danja.

W Kopenhadze funkcjonuje 7 kursów esp. W Gjedvad, Esp. jest wykładany w seminarjum.

### Norwegja.

W Trondnjem — otwarto wystawę esper. W Bergen wykłady Esp. w szkole handlowej.

### Ameryka.

Międzynarod. kongres chemików w Waszyngtonie przyjął rezolucję na korzyść Esperanta.

**Brazylja.**

Na II Braz. kongresie pedagogów wyrażono życzenie, aby obowiązkowe wykłady Esperanta wprowadzono do wszystkich szkół. Rząd stanu Sergipe przychylił się do tego życzenia i postanowił wprowadzić wykłady Esper. do szkół miejskich i gimnazjów stanu.

Esperanto zdobywa sobie gorącą sympatię w kołach parlamentarnych dzięki propagandzie członków parlamentu pp. Grimalad i Bachheuser. Ostatni wygłosił niedawno w parlamencie, z powodu rozparzowania budżetu Ministerjum Oświaty, wspaniałą mowę o Esperancie.

**Bibliografio.**

**Juljusz Słowacki. Mazepa.** Tragedio en kvin aktoj, el la lingvo pola tradukis Antoni Grabowski, Paris Librairie Hachette et C-ie. 1912. Paĝoj X + 90, prezo Fr. 2.

**Halka.** Opero en kvar aktoj. Muziko de S. Moniuszko — Teksto de W. Wolski, el la lingvo pola esperantigis Antoni Grabowski. Paris, Librairie Hachette et C-ie. 1912. Paĝoj X + 38, prezo Fr. 1.

Mazepa kaj Halka, prezentitaj esperante sur la krakova scenejo dum nia oka jubilea kongreso, estis aperintaj kiel du volumoj de la luksa „Esperanto - Kolekto de la Revuo.“ Ambaŭ librojn antaŭiras antaŭparoloj pri la vivo kaj la verkoj de la aŭtoroj kaj finas ilin klarigoj, faciligantaj al alinacianoj la plenan komprenon de la tekstoj. En „Halka“ la tradukinto aldonis „Enhavon laŭ la partituro.“ Ĉar la numeroj de la tekstoj respondas al la 20 ankaŭ aparte riceveblaj numeroj de la fortepiana partituro, eldonita kun tekstoj pola kaj itala, do tiu ĉi aranĝo ebligas eĉ nun la diskonigon de la ĉarmaj melodioj inter la alilandaj esperantistoj. La fortepianan partituron por ĉiuj kantvoĉoj, kun subskribita plena teksto esperanta, pretigis ankaŭ la tradukinto, sed kredeble ĝi ankoraŭ longe atendos eldononton.

Ambaŭ verkoj, kies provizo estis elĉerpita en Krakovo dum la kongreso, estas ankoraŭ riceveblaj en la la librejo de M. Arct.

A. G.

**Tutmonda Biblioteko je la memoro de L. Tolstoj.** Eldono de la firmo „Posrednik“ Peranto. Moskvo. 1912.

**N-ro 1. Dio — unu por ĉiuj.** (Surata kafejo). Rakonto de L. Tolstoj, laŭ Bernardin de St. Pierre. El la rusa lingvo esperantigis Anna Ŝarapov. Paĝoj 12. Prezo 4 k. (5 sd.)

**N-ro 2. Unu animo en ĉiuj.** Kunmetis L. Tolstoj. El la rusa lingvo esperantigis Anna Ŝarapov. Paĝoj 16. Prezo 4 k. (5 sd.)

**N-ro 3. Unua Ŝtupo, aŭ senmortiga nutrado.** Verko de L. Tolstoj, unua honora prezidanto de la Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Vegetaranoj.

El la rusa lingvo esperantigis Anna Ŝarapov, nacia sekretario por Rusujo de I. U. E. V. — Paĝoj 48. Prezo 10 k. (11 sd.)

**N-ro 4. Per kio homoj estas vivaj,** rakonto de L. Tolstoj. Tradukis el la rusa lingvo N. Kabanov. Paĝoj 32. Prezo 7 k. (8 sd.)

**N-ro 5. Dio vidas veron, sed ne baldaŭ diros.** Rakonto de L. Tolstoj. Tradukis el la rusa lingvo N. Kabanov. Paĝoj 16. Prezo 4 k. (5 sd.)

**N-ro 6. Du maljunuloj.** Rakonto de L. Tolstoj. Tradukis el la rusa lingvo N. Kabanov. Paĝoj 32. Prezo 7 k. (8 sd.)

**N-ro 7. Kie estas amo, tie estas dio.** Rakonto de L. Tolstoj. Tradukis el la rusa lingvo N. Kabanov. Paĝoj 20. Prezo 6 k. (7 sd.)

**N-ro 8. Sieĝo de Sebastopolo.** Rakonto de L. Tolstoj. Tradukis el la rusa lingvo N. Kabanov. Paĝoj 72. Prezo 15 k. (17 sd.)

**N-ro 9. Kalkaza Militkaptito.** Rakonto de L. Tolstoj. Tradukis el la rusa lingvo N. Kabanov. Paĝoj 36. Prezo 8 k. (9 sd.)

**S-ro I. Gorbunov-Posadov,** ĉefa redaktoro-eldonanto de la firmo „Posrednik“ komencas la antaŭparolon al tiu-ĉi verkareto de la rusa genia aŭtoro per jena klarigo:

„Unu animo en ĉiuj“ — vere diras L. Tolstoj. Tial ĉefa tasko de homa vivo estas ĉiam pli granda frata unuiĝo de homoj, de gentoj kaj de popoloj kaj, plue, unuiĝo de ĉio vivanta sur la tero.

La eldona firmo „Posrednik“ (Peranto), kiu estas fondita de L. Tolstoj en 1885 jaro, kaj kiu nun estas esperantia entrepreno, starigis kiel sian taskon eldonadon de libroj, disvastigantaj ideojn de la frata unuiĝo de homoj kaj de ĉio vivanta en mondo. Pro tio ke la internacia lingvo Esperanto estas kreita nome por tia celo de la unuiĝo de homoj de ĉiuj gentoj kaj popoloj, la eldona firmo nun komencas eldonadon de libroj en „Esperanto.“

Ĝis nun aperis 9 verketoj de L. Tolstoj en korekta esperantigo de s-ino Anna Šarapov kaj de d-ro N. Kabanov, kiu lasta estas samtempe redaktoro de tiu-ĉi serio. La tre malalta prezo de la bele eldonitaj libretoj helpas multe ilian disvastigon kaj la diskonigon de la ideoj de la granda pensulo inter la diversnacia esperantistaro.

A. G.

**Grafo A. Tolstoj. Princo Serebrjanij.** Historia romano. El la lingvo rusa tradukis s-ino M. Šidlovskaja. Literatura aldono de gazeto „La Ondo de Esperanto.“ Librejo „Esperanto,“ Moskvo, Tverskaja 26. Ruslando. 1912. Paĝoj IV + 278. Prezo \$<sup>1,20</sup> (\$<sup>1,60</sup> afrankite).

Nia esperanta literaturo ree pliriĉiĝis per grava verko, la granda historia romano „Princo Serebrianiĵ“ de grafo Aleksio Tolstoj, glora poeto, dram- kaj roman-verkisto de Rusujo (\* 1817 † 1175). „Princo Serebrianiĵ“ sendispute apartenas al ĉefverkoj de la rusa beletristiko, pro la originala, altgrade bela stilo, tre interesa enhavo kaj la realeco de la historiaj faktoj. La romano estas ĝis nun multe legata en Rusujo kaj estas tradukita preskaŭ en ĉiujn lingvojn eŭropajn. Ĝia ĉefa heroo estas la rusa caro Ivan Kruela, kies demona figuro estis ĉiam plej alloga temo de rusaj roman- kaj dram-verkistoj. La tradukintino plenumis sian malfacilan taskon kun granda zorgemo kaj talento. Multaj klarigaj rimarkoj de la tradukintino plifaciligas la komprenon de tiu-ĉi belega verko.

Pri la korekteco de l' stilo plej bone atestas la cirkonstanco, ke nia kara Majstro, ricevinte dum la presado kelkajn ĉapitroj de la traduko, feliĉigis s-inon Šidlovskaja per sia aproba gratulo.

A. G.

**Methoda Kühnlova.** Uplná methodická učebnice Esperanta pro školy a samouky. Tretí vydání doplněné a rozšířené. Vydal Ed. Kühnl, red. Časopisu Českých Esperantistů. Praha II. 2023. Dittrichova ul. 7. Paĝoj 144. Prezo bindite K. 2,40.

La plena metoda lernolibro por lernejoj kaj memlernantoj de s-ro Ed. Kühnl, aperis en tria plenigita kaj pligrandigita eldono. Jam la ekstera flanko de la Kühnla Metodo estas tiel alloga, tiel luksa, (belegaj: papero, preso, bindo) ke estas vera ĝuo preni tiun ĉi libron en la manojn. La riĉa, bonege prilaborita enhavo tute harmonias kun la eksteraĵo. Do ni estas certaj, ke la lernolibro, kiu laŭ nia

scio, estis ĝis nun uzata en 150 bohemaj kursoj kun sukceso plej kontentiga, daŭrigos samsukcese la disvastigon de nia kara lingvo en la progresema Bohemujo.

La aŭtoro ĉiam zorgas unuavice pri tio, ke la lernantoj progresadu de temoj konataj al pli konataj, kaj ĉiam li klopodas dum la klarigado alligadi la novajojn al parencaj punktoj de la lingvo gepatra. Tiu ĉi metodo estas ankaŭ imitinda por aliaj aŭtoroj de esperantaj lernolibroj.

Ĉar la Kühnla Metodo, krom gramatiko, ekzercaro, interparoloj, vortaroj, enhavas sufiĉe grandan krestomation esperantan kun artikoloj pri la historio de Esperanto, ĝia literaturo, pri niaj kongresoj, organizoj k. t. p., do ĉiu, kiu diligente trastudis tiun ĉi verkon, akiras jam sufiĉe vastan scion kaj konon pri nia lingvo kaj afero.

A. G.

**Esperanto — Klasika Libro.** Plena klasika libro de Esperanto (Oficialaj Dokumetoj, Oficiala Gramatiko, Oficiala Radikaro kun franca, angla kaj germana tradukoj). Ordigita kaj kontrolita de Th. Cart kaj M. Robert. Kolekto de Lingvo internacia. Paris. 1912. Presa Esperantista Societo 33. Rue Lacépède. Paĝ. 160. Prezo 1 fr. (0,40 \$<sup>6</sup>)

La elegante eldonita, malgrandformata verketo, enigebla en veŝtupoŝeton, kiel la ĉefeĉaj ŝlosiloj, enhavas, kiel tion montras la titolo, la tutan municion de fidela fundamentano. La nomoj de s-ro prof. Cart, direktoro por la Komuna kaj Teknika Vortaro en la Akademio kaj de s-ro Em. Robert, ĉefa kunlaborinto por la Unua Oficiala Aldono al la Universala Vortaro, garantias, ke la legantoj vane serĉus erarojn en tiu-ĉi klasika libro kiu tiun ĉi nomon plenrajte meritas. Ni povas nur bedaŭri, ke la aŭtoroj, pro troa skrupuleco, dekliniĝis de la fundamento, forlasinte la polajn kaj rusajn tradukojn de la radikoj. — La radikoj de la oficiala aldono estas tute prave presitaj per aliaj literoj, kio ebligas plenan orientigon.

Ni esperas, ke laŭ § 4 de la Bulonja Deklaracio, kiu konsilas pri novaj, eble ankoraŭ necesaj vortoj, imiti la kreinton de Esperanto, la direktoro de la Vortara Sekcio en la Akademio, preparante la duan eldonon de sia verko, povos jam, aldoni oficiale multajn vortojn, uzatajn de d-ro Zamenhof, kiuj ankoraŭ mankas en la „Klasika libro.“ Tio estas necesa por la unueco de nia lingvo.

A. G.



## Revuo de la gazetoj.

Lingvo Internacia. (Nov.)

Ŝtonigo de Lingvo.

„Al la Esperantistaro, en kies manoj ne pre estas la sorto de nia lingvo, la Akademio konsilas, ke ĝi uzu kun la plej granda modereco sian povon enkonduki kaj, per uzo, aprobi novajn vortojn. Estas ĉies devo, antaŭ ol uzi novan vorton, zorge konstati, ke ĝi ne estas superflua, alivorte, ke ĝi ne estas anstataŭebla per taŭga vorto, ĉu fundamenta, ĉu almenaŭ tre ĝenerale uzata.“

Ĉu per tia konsilo, per konsiloj ankoraŭ pli severaj al la aŭtoroj de Vortaroj kaj Lernolibroj, la Akademio ŝtonigas nian *vivantan* lingvon?

Tute ne; sed li tre bone konscias, ke nia komuna lingvo devas pliriĉiĝi malrapide kaj kvazaŭ senrimarke.

Normala, senrompa povas esti la evoluado, nur se ĝi estas tute trankvila kaj natura.

Febreca agitado ne estas vivo, sed ofte la signo de komenciĝonta defalo.

Tro rapida kreskado disigus, por tiel diri, la branĉaron de la firma trunko kaj de l' radikoj. Dum kelka tempo tre bela, tre verda ŝajnus eble la foliaro, sed baldaŭ ĝi velkus, sekiĝus kaj kun ĝi mortus la tuta arbo.

Antaŭ ol enkonduki novan vorton, ĉiu do demandu sin, ne nur, ĉu ĝi ŝajnas al *li* necese, sed kiamaniere oni tradukus en aliajn naciajn lingvojn la ideon, kiun li deziras esprimi. Plej ofte li konstatos, ke tiuj lingvoj alportas al li solvon, kiu tute ne necesigas la kreon de nova radikoj.

Oni ne forgesu aliparte, ke la riĉeco de lingvo ne konsistas nur en la multnombreco de la vortoj, sed ofte kaj ĉefe en ilia *elasteco*.

Granda merito, granda supereco de Esperanto super ĉiuj artaj lingvoj estas precize tia elasteco, dank' al kiu nia ĉlutaga lingvo fariĝis viva kaj natura.

Tiun elastecon ni konservu jaluze kaj ni zorge evitu rigidigi — *vere ŝtonigi* — la lingvon per tro severa, tro mallarĝa difino de ĉiu radikoj.

Th. Cart.

**Ricevitaĵ gazetoj:** Aŭstria Esperantisto, Belga Esperantisto, The British Esperantist, Bohema rev. esp., Brazilia Esperantisto, Bulletin Officiel, La Dek - Sepa, Esperanto, Espero Katolika, Esperanta Stelo, Fervoja Esperantisto, Finna Esperantisto, Germana Esperantisto, Germ. Esp.-Gazeto, Intern. Stenogr. Gazeto, Informanato, Intern. Pedagog. Revuo, Juna Esperantisto, Kataluna Esperantisto, La Kulturo, Kuracisto, La Langue Internationale, Lingvo Internacia, La Marto, Le Monde Esperantiste, La Movado, Mitteilungen, Monda Poŝto, La Ondo de Esperanto, Panonio, Paris Esperanto, Poŝta Esperantisto, Sarta Stelo, Svisa Espero, Le Travailleur Esper, Tutmonda Espero, La Verda Standardo, Vekiĝo.

**Novaj gazetoj:**

Homaro, esp. mon. - 1 S jare, Hispaniĝo.

La Internacia Abstinenta Observanto, esper.-germ., mon. 2 Sm. jare, Brockhof, Bomlitz (Hannover, Germ.)

## Ĥeteroj al la Redakcio.

Estimataj Sinjoroj!

Pro la agado de kelkaj samnaciaj Esperantistoj, kiuj por kontraŭbatali miajn personajn sentojn, kolumniis nian „Genova Esperanto Unuigo“, kontraŭstaris al la nacia Asocio, disvastigis antaŭ kelkaj monatoj la malveran sciigon, ke la 9-a Kongreso plu ne okazos en Genova, disvastigis la famon, ke oni intencas fari la Naŭan Kongreson liberpensula kongreso, kaj semis konstante en la nomo de la samideaneco la malkonsenton en niaj vicoj, penante ruinigi nian Societon; pro la malmulta tempo, kiu nune restas al mi libera de miaj privataj aferoj, mi estis bedaŭre devigita: por ne plu esti kaŭzo, ke oni malhelpu al suk-

cesplena laboro de la unua itala esperanta urbo; por ke oni ne plu dubu pri la neitral-eco ekŝiĝi: de Prezidanto de la Genova Esperanto - Unuigo; de Prezidanto de Itala Esperanto - Asocio; de Delegito de U. E. A.; kaj de l' organiza Komitato de la nalla universala Kongreso.

D-ro Alfredo Stromboli.  
Via Gropallo, 3.  
Genova (Italujo) \*)

\*) Jen la nova viktimo de personaj intrigoj kaj konfliktoj!

Red.

## Estimataj Sinjoroj!

Malgraŭ miaj petoj la redakcio de Belga Esperantisto ne plenumis la solan kondiĉon, kiun mi postulis, kiam, ne demandante min, ĝi decidis enpresi en tiu ĉi ĵurnalo mian verkon pri „Historio de Esperanto.“ Miaj multfoje ripetitaj petoj, ke ĉiuj presprovajoj estu al mi senditaj por korektado, restis sen rezultato.

Alvenis tio, kion mi timis, — eĉ en multe pli granda grado ol mi iam povis supozi: la verko estas plena da teruraj eraroj, kiujn oni eĉ ne povas konsideri kiel preserarojn. Ili montras, ke oni ne komprenis, kion oni enpresas. Ĉar la redakcio ankaŭ ne enpresis la korektajojn, kiujn mi al ĝi sendis jam post la apero de la verko, mi estas devigita peti vin fari tion en via gazeto. Mi notas *nur* la plej gravajn erarojn, pro kiuj la teksto fariĝas plene nekomprenbla:

p. 63 anst. *fondon* devas esti: *fundon, bazon*

„ 155 v. 12: *Z. ne solene triumfis* signifas *Zamenhof ne sole ne triumfis.*

p. 156 en rimarko: anst. *Al lastaj — El lastaj.*

p. 156 v. 1 en *Belgujo—po 1 en Belgujo, Anglujo* k. c.

p. 157, v. 10: *akceptas — akceptus...*

„ 158, v. 1: *verkiojn — verkojn.*

„ 159, v. 6: *anaro kun anu fari anu — fari unu anaron kun unu paŝtisto.*

p. 160, v. 28: *dato da cenzuro — dato de cenzuro.*

p. 160, v. 35: *ne trovas — ni trovas.*

„ 160, v. 35: *multaj esperantistoj — multajn esperantistojn.*

p. 160, v. 32: *Polnacio — Poznacio.*

„ 161, v. 6: *endresis — enpresis.*

„ 161, v. 22: *per la lingvo—por la lingvo.*

„ 163, v. 24: *dance — dana.*

„ 192: *diverslantoj estis perte induegem-*

*aj — diverslandaj Esperantistoj. Sed tio estis nur privataj paroladoj, dum kiuj la parolantoj estis certe indulgemaj (mankas 1 verso)!*

p. 189 v. 17: *unua — nuna.*

„ 192 v. 13: *apartoj — apartaj.*

„ 194: *pri poŝtmarka internacia informejo (?) — pri poŝtmarko internacia, pri internacia informejo...*

p. 195: se la 3-a kunsido esti la 8-an de Aŭgusto, la 4-a ne povis esti la 7-an, sed la 9-an.

p. 263: *al la Ĝeneva por ĝia soleneco — al la Ĝeneva por ĝiaj fakaj laboroj, al la Cambridge'a por ĝia soleneco...*

p. 271 v. 19: *fondon — fundon, bazon.*

„ 275 v. 24: *estis — esti* k. c. k. c. k. c.

Mi jam ne parolas pri propraj nomoj, kiuj devis esti konataj de ĉiuj esperantistoj, kiel ekz.: *Grabourki* (Grabowski), *Trollo* (Frollo), *Mankouskajo* (Mankovskaja), *Bvzostourki* (Brzostowski), *V. Gerner* (Gernet), *Rakitsi* (Rakitski) k. c. k. c.

Fine, kiam mi laŭ peto de S-ro Grabowski sendis antaŭ 3 monatoj (en Julio) al la redakcio de Belga Esperantisto korektajn, koncernantan persone nian eminentan samideanon, la redakcio ne juĝis inda publikigi ĝin. Mi do faras tion nun: en ĉapitro II-a mi skribis, ke la unua persono, kun kiu Zamenhof povis unuafoje paroli esperante estis lia kolego d-ro Waldenberg. Tamen, kiel klarigis la Majstro mem, la lingvo, kiun parolis en jaro 1885 Zamenhof kaj Waldenberg, ne estis ankoraŭ Esperanto en ĝia definitiva formo. Nur en jaro 1887 okazis la unua vere esperanta interparolado de Zamenhof kun Antoni Grabowski.

Adam Zakrzewski.

## Humoraĵoj.

## Simple.

- Kio vin tiel incitis, kolego?
- Eterne tiuj virinoj... Ĉu vi neniam malpaciĝis kun la edzino?
- Neniam!
- Kaj ĉu vi ne havas maledukitajn infanojn?
- Nel
- Do, kiamaniere ĝi povas esti?
- Tre simple, mi neniam estis edziĝinta.

## Ruze.

*Instruisto:* (al sia maldiligenta lernanto)  
— En via aĝo Aleksando Macedona jam militakiris preskaŭ la tutan mondon...

*Lernanto:* — Eble, sed ĝi estas tial, ke lia instruisto estis Aristotelo.

# !KRISTNASKA DONACO!

Alproksimiĝas la festoj de Kristnasko kaj la Nova Jaro, ĉiuj volas tamenlere signi tiujn tagojn de ĝojo kaj gajo kaj, laŭ kutimo, faras unu al la alia diversajn donacojn... Kio do povas esti pli agrabla, ol ricevi la donacon de *espero* gajni almenaŭ malgrandan sumon, por ankoraŭ pli gaje pasigi la festajn tagojn?

Tiun ĉi esperon donas al ĉiuj niaj samideanoj **GRANDA ESPERANTA LOTERIO** organizita de la Propaganda Ligo „**PARKURBO ESPERANTO**“, kiu enhavas 90,000 gajnojn de 3 ĝis 1,000 markojn (kune en la sumo de 400,000 markojn) kaj, krom tio, inter ĉiuj gajnintoj estos lotumita:

**!BELEGA DOMO EN PARKURBO!** Valoranta „25.000 Mk.“ aŭ anstataŭ domo oni povas ricevi 20,000 Mk. per mono. La gajnojn estas ricevataj tuj post la prezento de la gajninta bileto, kion *faras nenia alia lotumado*. Kosto de ĉiu lotletero, enhavanta unu bileton, estas nur 1 Mk. (50 sd.)\* Por la personoj, dezirantaj okupi sin per vendado de la lotleteroj, kiel rekompenco por iliaj klopodoj, estos disdonitaj 360 premioj en la sumo de 50,000 markoj kaj, *krom tio*, ankaŭ **DOMO EN PARKURBO ESPERANTO**, valoranta 18,000 Markojn, aŭ 15,000 Mk. per mono.

Pli detalajn informojn kaj ilustritajn prospektojn oni postulu de la Propaganda Ligo „Parkurbo Esperanto“, München, Pfandhasstrasse, 8.

\*) Rim. — Aĉeti biletojn havas rajtojn *nur la anoj de la Propaganda Ligo*, sed la aliĝo estas tute senpage; oni devas nur skribi pri tio leteron, aŭ poŝtkarton.

## Obszerny Słownik Esperancko-Polski

zawierający około 7000 pierwiastków i słów pochodnych

○○○○○○ St. Czarnowskiego. ○○○○○○

Z dodaniem artykułu o Esperancie i gramatyki w wydaniu II-im wyszedł jako № 15 „Bibl. handlowej“

▲ ▲ ▲ ▲ ▲ Do nabycia w księgarniach ▲ ▲ ▲ ▲ ▲

CENA 75 KOP.

## Kuracisto

Internacia Medicina Monata Revuo. Unika Kuracista Gazeto Tute en Esperanto. Ĉiumonate Oficialaj Komunikadoj de la T. E. K. A.

Jarabono: Sm 3. Por T. E. K. A. — anoj — senpage.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio:

Varsovio, str. Szopena № 1 Redaktoro: *D-ro Ludwik Chybczyński*.

## Germana Esperantisto

Duonmonata gazeto por la disvastigo de la lingvo Esperanto  
La gazeto aperas en du eldonoj, kiuj duonmonate alternas.

Eldono A, eliranta la 5 an de ĉiu monato, celas la propagandon por Esperanto.

Eldono B, eliranta la 20 an de ĉiu monato, estas pure literatura.

Jara abonprezo por Germanujo kaj Aŭstrio-Hungarujo 4 M. (2 Sm.), por ĉiuj aliaj landoj 2,250 Sm.

La abonoj nur komenciĝas en Januaro, Aprilo Julio kaj Oktobro.

Laŭdezire oni povas aparte aboni ĉiun el ambaŭ tute sendependaj eldonoj por la duono de la supre montritaj prezoj.

Esperanto Verlag Möller i Borel, Berlin SW., Lindenstr. 18/19.

## The British Esperantist

VIII-a jaro. — Mondkonata pro sia pura stilo en literaturo! Aperas ĉiumonate!

Speciale redaktita fako pri Tutmonda Kroniko  
Jarabono: Fr. 4 (1,50 Sm.).

Adreso:

Museum Station Buildings 133—136, High Holborn, London.

En la

## Esperanta Scienca kaj Literatura Librejo

aperos laŭvice sekvantaj libroj:

N-ro 1. *D-ro J. B. Marchlewski*: Ekonomio socia — kio ĝi estas kaj kion ĝi instruas. Prezo 10 Sd.

N-ro 2. *Feliks Perl*: Historio de Granda Franca Revolucio. Prezo 10 Sd.

N-ro 3. *D-rino Daszinska-Golinska*: La moderna alkoholismo. Prezo 10 sd.

N-ro 4. *Gerhard Hauptman*: La Teksistoj. Dramo en 5 aktoj. Prezo 20 Sd.

N-ro 5. *P-ro D-ro Anfon Menger*: La politiko de l'popolo. Generalaj principoj de ĉiu vere demokratia politiko. Prezo 25 Sd.

N-ro 6. *Wilhelm Bölsche*: La deveno de l' homo. — Grandioza, ĉe tio facile komprenebla prezento de la sciencaj principoj de Darwinismo kun konsidero de la plej novaj esploroj. Prezo 25 Sd.

Ekster la serio aperis:

*P-ro D-ro Odo Bujwid*: Kvin prelegoj pri bakterioj. — Skizo pri generalaj principoj de bakteriologio en apliko al infektaj malsanoj. Kun tabelo de 20 mikrofotografajoj. Esperantigis Emilo Pfeffer.

Prezo 50 Sd.

**OFICIALA**

## Gazeto - Esperantista

Organo de la Lingva Komitato, de la Konstanta komitato de la Kongresoj kaj de la Internacia Konsilantaro

Unu numero Sm. 0.200. Jara abono: Sm. 2.—

Redakciejo kaj Administrejo: 51, rue de Cligny, Paris.

## LINGVO INTERNACIA

(fondita en jaro 1895)

Centra organo de la Esperantistoj, eliranta post la 15-de ĉiu monato.  
Ĉiunumere 48 paĝoj. Formato 13<sup>1</sup>/<sub>2</sub> × 20<sup>1</sup>/<sub>2</sub> cm.;  
Jara abono: 5 fr. (Sm 2).

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue Lecépède, Paris (Francujo).

## „LA ONDO DE ESPERANTO.“

MONATA ILLUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909).

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj „Princo Serebjanij“, kies prezo por ne-abonintojn estas Sm. 1,60 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913, — krom 12 n-roj de l'gazeto, — senpage ricevos donaco belan Esper libron:

## „ORIENTA ALMANAKO“

el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p. k. t. p.

„La Ondo“ aperas akurate la 1-an daton, novstilo. Ĉiu n-ro havas 16—24 paĝ. Formato 17×26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotoj. Korespondo tutmonda. Poŝt. ilustr.

## Anonco en „Koresp. Fako“ — 3 respondkuponoj

La abonpagon (2 rubl. = 2, 120 sm). oni sendu al librejo „Esperanto“ (Moskvo, Tverskaja, 26, Ruslando) aŭ al aliaj Esper. librojoj — poŝtmandate, respondkupone, papermonero, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. Ĉekbanko.

Oni povas aboni „La Ondon“ pere de nia Administra-  
cio, Ŝopena 8, Varsovio.

## La unua revuo Esperantista por la junularo JUNA ESPERANTISTO

Monata Gazeto ilustrata  
por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj.

En „Juna Esperantisto“ troviĝas: diversaj rakontoj kaj noveloj por la junularo, fabeloj, poemoj, lingvaj ekzercoj, amuzoj, problemoj, k. t. p.

La jaran abonon: 2 fr. 50 (1 Sm) sendu al librejo „Esperanto“. Moskvo Tverskaja, 26.

Librejo Hachette & Ko.,

79, Boulevard Saint-Germain, Paris

## Scienca Gazeto

Internacia monata revuo pri scienco kaj industrio  
Oficiala organo de la „Internacia Scienca Asocio Esperantista“. Ĉefredaktoro: Ch. Verax.

Tiu nova revuo celas konigi la plej gravajn kaj novajn eltrovaĵojn kaj elpensadojn de la homa spirito, kaj tial ĝi estas interesa vulgarigilo por la scienca kaj industria progreso.

Verkita klare, precize simple, ĝi povas esti, pro tiu kaŭzo, komprenata de ĉiuj; unuaparte de ne-teknikistoj aŭ nescienculoj; aliaj parte de la novaj adeptoj de nia lingvo.

Jara abono Fra. 7,50 (Sm. 3), apartaj numeroj  
Fra. 0,25 (Sd. 30).

— Petu senpagan specimenon de la Librejo Hachette & Ko. —

POŁECAMY ZNAKOMITY PODRĘCZNIK

## PAWŁA BERT'A

### Elementarny Kurs Nauk Przyrodniczych

W tłumaczeniu ANNY KRATZER, z 48 wyd. fran.

WYDANIE II

TOM I. Rok pierwszy — dla dzieci od 7 do 10 lat. Treść: Człowiek. — Zwierzęta. — Rośliny. — Minerale. — Zjawiska codzienne 173 rycin. Cena w broszurze rb. 0,50, w oprawie 0,65.

TOM II. Rok drugi, — dla dzieci od 10 do 12 lat. Treść: Człowiek. — Zwierzęta. — Rośliny. — Kamienie. — Fizyka. — Chemia. — 300 rycin. Cena w broszurze rb. 0,65, w oprawie 0,80.

TOM III. Rok trzeci, — dla dzieci od 12 do 15 lat. Treść: Zwierzęta. — Rośliny. — Kamienie. — Ziemia. — Fizyka. — Chemia. — Fizjologia zwierząt i roślin. — Wiedza stosowana. — 550 rycin. Cena w broszurze rb. 1,15 w oprawie 1,35.

ŻĄDAĆ WE WSZYSTKICH KSIĘGARNIACH

SKŁAD GŁÓWNY KSIĘGARNI GEBETHNERA I WOLFFA W WARSZAWIE.